# Aŭstraliaj Esperantistoj

**Novaĵa Letero** de **Federacio de Aŭstraliaj Esperantistoj**

NI SENDAS AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KUN KONATA RETADRESO

http://beta.visl.sdu.dk/lingvohelpilo/

auto 13/10/2012 Sepdeknaŭa Eldono 2012 13/10/2012 SENDITA


Tiu ĉi letero havas "hiperligilojn" al retpaĝoj KLAKU! KLAKU! KLAKU!

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rspring@tpg.com.au;

Provlegita de Nicole Else

La informa kaj noma paĝoj nur aperos en la dekaj eldonoj

## GRAVAJ DATOJ vidu Tamen Plu de Bob Felby

**Kiam oni ne informas, onidiroj plenigas la mankon da informado**

**Skribu, informu 198 retadresaranojn de AE pri viaj novaĵoj**

## Parto kun hiperligiloj

## Klaku! KLAKU!





## AŭSKULTU, LEGU ESPERANTAN RETRADION TAGE



Informaj rakontetoj, Bona lingvo, Malmultaj minutoj.

Plibonigu vian Esperanton

http://members.aon.at/aldone/peranto/index.html

http://peranto.posterous.com/esperanto-edzperanto-en-brazilo **ankaŭ** havas du filmetojn



## LINGVO -LERNADO KRESKIGAS LA CERBON

En la sveda Milit-akademio por interpretistoj junaj

rekrutoj lernas novajn lingvojn tre rapide. Mezurante ilian cerbon antaŭ kaj post la lingvo-trejnado, grupo de esploristoj havis eblecon observi tion, kio okazas al la cerbo, kiam ni lernas novan lingvon en intensiva maniero.

http://www.poliglotti4.eu/php/media-centre/index.php?doc_id=2228&lg=en

Trovis kaj sendis Nicole

# KLUBNOVAĴO





La Manlia Esperanto Klubo kunvenos la 3an de novembro
Ĉiuj bonvenaj



EFNSK Jarkunveno en Esperanto Domo
dimanĉon la 28an de oktobro 11atm ĝis 12 ptm
BBQ lecionoj filmetoj sekvos je 12ptm ĝis proksimume 4ptm
Ĉiuj bonvenaj

## Ĉu via klubo kunvenis? as? os?



Maldetala informo sufiĉas. Skribu al AE rspring@tpg.com.au
Sendu desegnon aŭ foton taŭgan por via grupo kun malgranda raporto







# AEA Informas

### AEA estraro kunvenis 11/10/12

Ni ŝatus havi raporton pri niaj kunvenoj en ĉiu AE,
Jen la unua
Amike,
Sandor
………………………………………………………………………………

# LA NOVA ESTRARO RAPORTAS:

Heather, Indrani, Kam Lee, Margaret kaj Sandor partoprenis la lastan Skajp- kunvenon. (2012-10-11)

Jen kelkaj el niaj diskutoj kaj decidoj.

- Ni decidis meti mallongan raporton pri niaj kunvenoj en AE.

- La Esperanto-evento en januaro okazos:
17/01 – 21/01/2013 en "International House" **en Melburno, kie jam okazis multaj somerkursaroj.** Ni nun organizas la detalojn.

Ni deziras, ke multaj homoj kontribuu al la programo. Bv kontakti nin, se vi volas/povas helpi.
- Ni esperas, ke la flugfolio pri tiu evento/kongreso kune kun letero stimulanta homojn (re)aliĝi al AEA estos sendita baldaŭ.
- Indrani daŭrigas la esploradon de nia financa situacio.
- Dum la venonta kunveno ni diskutos nian retpaĝaron

Amike, Heather, Indrani, Kam Lee, Margaret, Sandor

# LETEROJ mallongaj de la legantoj




## Malpli ol duona paĝo

Dankon Roger. Ankaŭ dankojn al Hazel, Margaret kaj Nicole, pro la tre interesaj artikoloj. Vera Re: Aŭstraliaj Esperantistoj 78

# LETEROJ IOM LONGAJ

Pli ol duona paĝo

## MWAA BONVENIGAS VIN. (Multicultural Writers Association of Australia)

Karaj Membroj kaj Amikoj, Gefratoj en Belartoj,

Bonvenon al *Hypallage*, nia ret-gazeto, kiu celas la antaŭenigon de kultura diverseco, pozitive dissemadante informadon kaj liberecon de opinio.




Mi kredas ke *Hypallage*, antaŭenpuŝos, per interŝanĝado de debato, analizo, kreado kaj kontribuado, komunan kontakt-punkton, kiber-centron, spacon por via literatura verkado. Post iom da tempo, *Hypallage* fariĝos ankaŭ lokon de debato, analizo, kreado, kaj kontribuado.

Ni kuraĝigas vin partopreni kaj uzi ĉi-tiun potencan ilon de amikeco kaj komunikado.

Via kontribuado eĉ plibonigos ĉi-tiun literaturan spacon, liverante oportunojn por kune aŭ individue labori pri projektoj rilate al Verkado, Kultura Diverseco kaj temoj kiuj rilatas al Aktuala Kulturo en Aŭstralio kaj la Mondo.

MWAA dankas nian Vic-Prezidanton, Jorge Salavert, kies ideo naskigis Hypallage.

Bonkore Via en Belartoj,

**Jorge René Galleguillos-Pozo** http://hypallage.wordpress.com/

President, Multicultural Writers Association of Australia Inc.

sendis Max Wearing

## LINGUISTIC DIVERSITY & SOCIAL INCLUSION

Vendredon mi ĉeestis konferencon en la universitato Macquarie en Sidnejo. La nomo de la konferenco estis **Linguistic Diversity & Social Inclusion.**



Ĝi estis organizita de profesoro Ingrid Piller. Eble iuj el vi legis la bonegan artikolon de Ingrid Piller pri Esperanto, kiun ŝi verkis en julio ĉi-jare. http://www.languageonthemove.com/language-learning-gender-identity/the-power-of-esperanto

Tiu-ĉi ligo jam aperis en **Aŭstraliaj Esperantistoj** supozeble fine de julio. Dum la konferenco mi disdonis kelkajn faldfoliojn pri Esperanto. Ingrid invitis min paroli pri Esperanto en la universitato venontjare.

Hodiaŭ okazis prelegetoj pri tre diversaj temoj, ekzemple pri afrikaj frizistoj en Sidnejo, pri kantado en la irlanda lingvo en Aŭstralio, pri dulingva antaŭlernejo en Sidnejo, ktp.

Bedaŭrinde multaj gepatroj ankoraŭ ne aprezas dulingvecon. Ili sendas siajn infanojn al tiu lernejo nur pro la fakto ke ĝi estas proksima al ilia hejmo kaj tute ne subtenas la lingvolernadon de siaj infanoj ekster la lernejo.

Konklude mi havas la impreson, ke en nia socio lingvaj problemoj estas tro ofte ignoritaj. Nicole





# The English Section





## mallongaj mesaĝoj por novuloj

FYI – multi-cultural festival in Maitland this Saturday 13 Oct 2012.

Includes a language lounge where you can learn phrases from different languages.

Free samples of cultural food Easy walk from trains.

http://www.maitlandriverlights.com.au/

regards,

Andrew Spannenberg the bearded one